


LA JUNIA VIVO



MONATA ORGANO POR LA JUNULARO, INSTRUISTOJ, KAJ AMIKOJ DE LA JUNULARO

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.

ĜIRONUMERO 382363. • JARABONO 2,50 NED. GULD. AŬ EGALVALORO

LA FUMADO KAJ LA KANCERO.

Malbona kutimo de la homoj estas, ke la plimulto el ili neniam pripensas la sanstaton de sia korpo, ĝis en ĝi okazas io, kio malsanigas ĝin. Kaj kiam ili estas malsanaj, ili ĉiam diras: „Ne mi kulpas pri la malsano, sed la vetero, la malvarmo aŭ la varmo, la malseko, iu bacilo” k.t.p.

Ĉiam la homoj serĉas la kaŭzon en la ekstera mondo kaj preskaŭ neniam en sia propra korpo, en la propra spirito.

Ho jes, mi scias, ke la ĉirkaŭaĵo havas grandan influon al la vivo. Sed ĉi tie kuŝas stranga afero antaŭ ni: La plej multaj homoj ne ŝatas vidi malbonaĵojn en si mem kaj ŝovas la respondecon pri la malbono en la mondo kaj en si mem sur aliulojn kaj aliaĵojn malproksimajn de ili.

En Amsterdamo troviĝas la „Van Leeuwenhoek-Domo”. Sur la ekstera flanko oni vidas nenion rimarkindan, sed interne de ĝi estas konstatitaj jam multaj mortigaj tumoroj. Ĝi ja estas unu el la plej konataj kancero-centroj en Nederlando. Ĝin vizitas centoj da malsanuloj.

En tiu domo laboras tre klera kuracisto. Li esploris multajn pacientojn kun kancero en la pulmoj kaj unu afero frapis lin: la

nombro de tiuj pacientoj pligrandiĝis dum la lastaj jardekoj, kiel ankaŭ la scienculoj en aliaj landoj rimarkis.

„Kio povas esti la kaŭzo de tiu progreso?” li demandis al si.

Por ekscii tion, li ankoraŭfoje tre bone esploris la historojn de ĉiuj siaj pacientoj kun kancero en la pulmoj. Li statistike prilaboris tiun materialon per komplika scienca metodo por akiri bonajn rezultatojn. Kio evidentiĝis?

Unue: la pulma kancero precipe troviĝas ĉe viroj, kvankam ankaŭ relative multaj virinoj suferas pro tiu malsano.

Due: preskaŭ nur „kapo”-laboristoj, t.e. intelektuloj, estas la viktimoj.

Kial do tiaj homoj? estis la demando. La kuracisto serĉis kaj serĉadis, faris multajn supozojn, legis aliajn sciencajn verkojn, sed fine li povis trovi por tiu mortiga teruraĵo nur unu ĉefan kaŭzon: la fumado!

Preskaŭ ĉiuj liaj pacientoj laboris en oficejoj k.t.p., do en ejoj, kie cerbo-laboro estas la plej grava. Do la plej bona okazo por fumado! Kaj evidentiĝis, ke ne nur la fumo de propra cigaro aŭ cigaredo havas influon, sed ankaŭ tiu de la kolegoj en la sama ejo, en kiu oni spiras la tutan tagon!

Ĉe kamparanoj, agrikulturistoj k.t.p. la pulma kancero estas maloftaĵo, kvankam la eblo ĉiam ekzistas.

Do la fumado povas havi gravajn sekvojn, ne nur tiajn „malsanetojn”, kia kronika tusado, kaj malbonan efikon al la koro kaj stomako.

Kial ni fumas?

Serĉu tre profunde en via psiko, en via spirito, ĉiam demandante: Kial? — Eble vi trovos ĉi tiun veron: „La homa korpo estas malsana, ĉar ĝia spirito estas malsana.”

La fumado estas nur unu kaŭzo de la korpa kaj spirita malfeliĉo. Serĉu aliajn!

El „Nederlanda Medicina Revuo” (N-ro 46, 1948) tradukis H. Wernik (medicina studento), Haarlem, Ned.

APUDMARA LIBERTEMPO.

(de Seosamh O Conaire, Irlando).

La maro! — Kiel tiu frazeto ravas min dum ĉi tiuj pluvaj, malvarmaj, malhelaj tagoj, kiam mi povas nur sopiri al la brila kaj ĝojplena somero. Por mi ĝi signifas naĝadon, velveturadon, promenadon kun tornistro surdorse, laŭlonge de la ĉiam ŝanĝiĝanta

marbordo. Ĝi signifas sed mi haltu, ĉar rememoraĵoj pri pasintaj apudmaraj libertempoj plenigas mian koron.

Ĉefe mi memoras la tagon, kiam granda, nedifektita savboato drivis en apudan golfeton. Apenaŭ ĝi surfundiĝis sur la arĝentkoloran sablon, kiam mia onklo — post interkonsento kun la ofi-cistoj — aĉetis ĝin.

Pro tiu okazaĵo komenciĝis por mi kaj miaj fratoj Gerry, Tom kaj Al serio de marvojaĝetoj laŭlonge de nia okcidenta marbordo, en la multaj golfoj kaj inter la allogaj insuloj.

„Allogaj”, mi diris, sed de temp’ al tempo ili estis allogaj ne pro beleco, sed pro la danĝero, kiun oni riskis, alproksimiĝante al ili per boato.

Kaŝitaj kaj perfidemaj rifoj ĉirkaŭas multe de tiuj insuloj, pro kio estis danĝere, eĉ por nia malgranda boato, ĉirkaŭkrozi sen mapo aŭ piloto. Tamen por ni la danĝero igis la vojaĝojn nur pli sportaj.

Unu el la plej interesaj insuloj — almenaŭ por mi — estis Ar-dillaun aŭ la Alta Insulo. Ĉi tie oni povas ankoraŭ vidi la restaĵojn de antikva monaĥejo. Kiel studento de arkeologio mi trovis la restaĵojn tre interesaj kaj sendube vidindaj. Mi suspektas, ke la fratoj taksis min freneza pro la intereso, kiun mi montris al la „senutilaj kaj seninteresaj ŝtonamasoj”.

Alia karakterizaĵo de la Alta Insulo estas la granda nombro de profundaj fendegoj kaj misteraj truoj, kiujn oni vidas ĉie sur la malgranda insulo. Efektive ili jam englutis multe da ŝafoj kaj iliajn paŝtistojn.

Ni bone ĝuis la „libertempon surmaran” ĝis iu dimanĉa mateno.

Ĉu mi iam forgesos tiun tagon? Ni estis veturontaj per la boato al Clifden (la ĉefurbo de la okcidenta montara regiono nomata Bonnemara, kie ni troviĝis). Ni intencis vidi la jaht- kaj boat-konkursojn kaj similajn surakvajn programerojn.

Ni ekfunkciigis la maŝinon kaj foriris de la kajeto maren. Nia vojo kondukis laŭlonge de la kontraŭmara flanko de la insulo. Apud la insulo, eĉ dum la plej kvieta vetero, oni povas vidi kaj aŭdi la ondegojn krakegantaj sur la rifojn. Ĝuste kiam ni estis ĉe la kontraŭventa flanko de la rifoj, aŭdiĝis maltrankviliga tusado kaj nekutimaj bruoj en la maŝino. Subite ĝi silentiĝis kaj la vento komencis forblovi nin tien, kie la ondoj tondras, al la tumulte bolanta ondŝaŭmo. Ni havis velon, sed nun ĝi nur plirapidigus la detruon.

„La remilojn!” kriegis Tom, kiu sammomente vidis, ke pro ies forgesemo ili ne estis en sia kutima loko.

Gerry, ĉiam aplomba, provis eltrovi la kaŭzon de la maŝindifektigo. Sed post momenta ekzameno li sin levis.

„Traflueto”, li diris, „neniom da petrolo.”

Li komencis senvestigi sin. Ni agis same. Neniu parolis. La tondrego dronigis ĉiujn aliajn sonojn. Mi rigardis la ŝaŭmon. Mi vidis la rokpintojn. Preter tio mi vidis la insulon, la teron, al kiu mi nun, tro malfrue, sopiris.

Bonŝance, ni ĉiuj scipovis bone naĝi. Se ni povus nur transiri la rokojn sen grava vundo, ni eble povus naĝi al la tero.

Mi turnis la antaŭaĵon de la boato al la rifo. Ni mem staris kune en la postaĵo. La marfluo plirapidigis. Ni estis pelataj sur la rokojn. Malfeliĉego minacis Krak!

(Daŭrigota).

Pasis 15 jaroj

Je la 30-a de majo, en la jaro 1935, okazis sur la nederlanda insulo Tekselo simpla solenaĵo: Oni inaŭguris Esperanto-monumenton honore al nia majstro, d-ro Zamenhof. Dank' al la energia laboro de la juna idealisto Johano Duinker ĝi stariĝis, kiel atesto de vigla Esperanto-movado. Fiere brilis la verda stelo super la insulo.

Pasis kelkaj jaroj. La milito eksplodis, kaj ĝi ne ŝparis la belan, pitoreskan insulon Laŭ germana ordono la monumento estis detruata. Nur la stelon s-ro Duinker povis savi.

Kaj nun — post 15 jaroj — la monumento estas rekonstruita sur la malnova fundamento, kaj la sama stelo ĝin kronas. Bela simbolo de la senmorteco de nia idealo!

Bedaŭrinde Johano Duinker ne ĝisvivis la rekonstruadon, kiun li tiom forte sopiris. Nur kelkajn tagojn antaŭ la fino de la milito li estis mortpafata.

Simpla memorplato en la monumento memorigas pri lia sindona agado.

Ni fosu nian sulkon!


Jes, ni fosu nian sulkon tra la mondon! „La Juna Vivo” volas esti taŭga „fosilo” por tio. Helpu disvastigi ĝin, por ke multaj ĝin uzu! Kaj bone subtenu ĝin, por ke ĝi glate funkcii!

En julio multaj devos pagi sian kotizon por la nova administra jaro. Vi multe helpas nin, pagante antaŭ la 1-a de julio.

Al la nederlandanoj ni post la 15-a de julio sendos kvitancon. Alilandanoj pagu al sia landa ĉefperanto (vidu la liston en la decembra n-ro) aŭ rekte al ni per respondkuponoj. — Se vi deziras finigi vian abonon, bonvolu ĝustatempe informi nin pri tio, por ke ni ne vane sendu la gazeton!

Adm. „La Juna Vivo”.

(Red. P. Korte, Schoolstr. 13, Veendam, Ned.
Centra Informejo: Einar Dahl, Uddevalla, Svedujo).



U.E.A.-Kongreso en Parizo.

Ni atentigas niajn abonantojn instruistajn pri la kunvenoj de I.L.E.I. en la kadro de la UEA-Kongreso en Parizo. **Jen la programo:**

Dimanĉon, la 6-an de aŭgusto: 16.00: Kunsido de la estraro de I.L.E.I., kune kun la komitatanoj kaj rajtigitaj reprezentantoj. London, la 7-an: 16.00: publika kunsido de I.L.E.I.

Salutvortoj.

Raporto de la sekretario, s-ro Einar Dahl.

Mallongaj raportoj de la landaj societoj kaj reprezentantoj.

Parolado pri: „Interrilatoj inter la Landaj Societoj kaj Reprezentantoj kun la Ligo” de la prezidantino, f-ino V. C. Nixon.

Diversaj aktualaĵoj. (Bonvolu informi la sekretariojn, se vi volas pritrakti ion).

Vendredon, la 11-an: 10.00: publika kunsido de I.L.E.I.

Diskutado: „La Klasĉambro kiel edukejo al Internacia Interkompreniĝo.” (Bazita sur la raporto de UNESCO), havebla anglalingva kaj franclingva: „Towards World Understanding”, numero V, 1949, de Unesco, Av. Kléber, Parizo, je kosto de 1 ŝ.

Kolego David Kennedy (Glasgow) petas la atenton de geinstruistoj, kiuj partoprenos la UEA-kongreson, pri kelkaj ĝeneralaj aranĝoj per subaj informoj:

Ĉi tiun jaron oni aranĝis la kongres-kunvenojn laŭ nova maniero — en kvar komisionoj. La unua komisiono, kiu ĉefe koncernas la instruistaron, pritraktos la temon „Esperanto en la lernejoj” en kvar subsekcioj.

- Esperanto en la unuagradaj lernejoj (11-12-j.)
- en la duagradaj kaj teknikaj lernejoj.
- en la supera instruado.
- Esperanto kiel helpilo por blinduloj kaj surduloj.

Dum la kunvenoj (la iamaj laborkunsidoj) tiuj, kiuj interesiĝas pri Esperanto kaj edukado, havos okazon pritrakti la suprajn temojn kaj en la tria tago, dum la ĝenerala kunveno de la tuta kongresanaro, oni donos resumon de la laboro, farita dum la an-

taŭaj tagoj. Kompreneble la aliaj komisionoj agos sammaniere.

Krome vidu la gazetojn „Esperanto” kaj „Heroldo”.

Noto de la redakcio: Ni forte esperas, ke multaj gekolegoj partoprenos plurajn kunvenojn, kiuj estas interesaj por ni. Tiam ni ja povos havigi al ni freŝan energion por labori sur la tereno „Esperanto en la lernejoj”, kie ni en la lasta tempo povas konstati rimarkindajn rezultatojn. Multo nuntempe dependas de la **laboro** (ne nur de la bona volo) de la geinstruistaro. Ni ne forgesu, ke ni vivas hodiaŭ en periodo, kiu influos grave la historion de morgaŭ. Ke „niaj nepoj nin ne **malbenu**”!!!

Esperanto en Seminarioj. Ni urĝe petas sciigon de adresoj de seminarioj, kie oni iel instruas Esperanton. Al tiuj adresoj ni sendos senpage dum kelka tempo nian organon. Ne forgesu kaj **helpu tuj**.

F-ino Dedieu sciigas ke salutos nian **instruistan kunvenon** dum la U.K. en Parizo, s-ro G. Waringhien, agregacia profesoro en Parizo.

Karaj Lernejoj,

En la lastaj konkursaj raportoĵoj mi kun ĝojo legis, ke partoprenis ankaŭ gejunuloj el Nederlando, Francujo, Norvegujo. Bonege! Ju pli da homoj partoprenas, des pli interesaj fariĝos la konkursoj kaj enigmoj!

Nur por la tria grupo estas malmulta intereso. **Ĉu ĝi estas tiom malfacila?** Feliĉe estis kelkaj „kuraĝulinoj”! (Strange, nur inoj. Kie restas la „viroj”???)

En ĉi tiu numero ni montras al vi la verkaĵon de Dorothy Kilgour, en Birmingham, per kiu ŝi gajnis la premion en la lasta konkurso.

Bone, Dorothy, mi gratulas vin! Ĉu vi mem praktikas viajn ideojn? Tiam vi certe estas bona propagandistino!

En la antaŭa konkurso Valerie Savin en Newcastle akiris la premion. Ŝi verkis pri d-ro Zamenhof. Ankaŭ vian verkaĵon ni metos en „La Juna Vivo”, Valerie, ĉar ĉiuj ja devas scii ion pri d-ro Zamenhof, ĉu ne?

Bedaŭrinde en ĉi tiu numero mankis spaco, do ni devos atendi ĝis la venonta monato. Ĝis tiam!

N. K.

Atentu la novan adreson de la sekretario kaj Libro-Servo de T.J.O.: M. Tinxgracht 10, Edam.



La kato estas bela besto.
 Ĝi ne estas tre granda.
 Ĝia vosto estas longa.
 La koloro de nia kato estas

1.


Ĝi | havas | du n | , du | , sed kvar | .



2.



3.



4.



5.

Ĉu la birdoj estas egalaj?

Kverelo sur la fenestro-breto (daŭrigo).

Unue la pinto iom liberiĝis. La folioj fariĝis pli longaj. Interne ĝi fariĝis iom blua. Fine la hiacinto havis belan, bluan floraron. Kaj ĝi tre bonodoris.

„Nun certe la aliaj tri trovos min bela!” ŝi esperis.

Kaj la aliaj bone vidis, ke la hiacinto bele floras. Sed ili ne volis diri tion. Ili estis ĵaluzaj, ĉar ili ne povis tiel bonodori.

Iun vesperon, kiam la sinjorino estis en la lito kaj la luno brilis sur la fenestro-breto, la ciklamo diris: „Via floro estas iom bela, sed la trunko estas tro rekta kaj dika kaj ankaŭ viaj folioj estas tiom malgraciaj. Kaj kiom mallumaj estas tiuj bluaj floroj! Ni, ciklamoj, havas maldikajn, graciajn trunketojn kaj belajn rondajn foliojn. Kaj niaj floroj estas blankaj, ruĝaj, rozetaj, kelkfoje siring-violaj.”

„Ne,” diris la hiacinto, „ni estas en ĉiuj koloroj: blanka, ruĝa, rozeta, blua, flava, viola.”

Kaj pro tio la ciklamo eksilentis, ĉar flavaj ciklamoj ne ekzistas

(Daŭrigota).

El la lerneja gazeto de Edamo, Nederlando.

Propagando de Esperanto ¹⁾.

Por la propagando de Esperanto la junularo povas havi ekspoziciojn. En ili ni povas montri fotografiaĵojn de junularkunvenoj, kiuj ni vizitis, kaj kliŝaĵojn de aliaj landoj, kaj tiam personoj eble deziros viziti la landon, kiu tre plaĉis ilin, do ili eble ankaŭ lernos la lingvon. Esperanton por paroli al alilandajn Esperantistojn. Se ĉiu Esperantisto portas sian insignon tiam aliland-Esperantistoj rekonos Esperantistojn kiam ili vidas verdan stelon. Ankaŭ se vi portas la verdan stelon kaj vi renkontos geamikoj kiuj ne scias la signifon de ĝi, ili demandas pri ĝi kaj eble ili diras pri ĝi al aliaj geamikoj kaj tiel plu. Tiam Esperanto pli atendas. Ankaŭ vi montrus la korespondleteroj kiuj vi ricevis de aliaj landoj; kaj ankaŭ vi rakontos pri ili. Esperantaj kantoj estas bone por la propagando de Esperanto kaj ankaŭ vi povas agi teatraĵojn kaj rimojn.

Mi opinias ke ĉiuj de la temoj kiuj mi priskribis estas bone por la propagando de Esperanto.

Dorothy M. Kilgour (15-j.), Northfield, Birmingham, Brit.

Ĉu vi scias?

1. Kiom da haroj homo povas havi sur sia kapo?
(ĉu 2000, 120.000, du milionoj, pli ol dek milionoj?)
2. Kiu besto estas la plej granda sur nia tero?
(ĉu elefanto, baleno, ĝirafo aŭ rinocero?)

G. Schaedel, München, Germanujo.

La solvojn vi trovas aliloke.

Muzika Leono.


Nu, iam muzika leono
Amuzis sin per violono.
Ĝi aŭdis la sonon
Kaj laŭdis la tonon
Kaj ludis al si violonon.

Nenjo Rimanto (kopirajto rezervita).

¹⁾ Ĉi tio estas la premiita verkaĵo de la aprila konkurso. Intence ni ĉifoje laŭlitere kopiis ĝin, do kun la eraroj. Eble tio kuraĝigos aliajn, kiuj ĝis nun ne kuraĝis sendi verkaĵojn, ĉar ili ne povas verki tute korekte — Red.

Mi tre ŝatas biologion kaj interesas min floroj, kiuj nutras sin per insektoj. Unu el ili kreskas ankaŭ en nia regiono. Ĝi nomiĝas drosero (*Drosera rotundifolia*).

Longe mi serĉis lokon, kie ĝi kreskas. Unu tagon mi faris kun nia instruisto, s-ro Bobek, kaj kamaradoj botanikan ekskurson. En la mezo de arbaro estis torfejo. Sur ĝi ni trovis malgrandajn droserojn. Mi kunportis kelkajn hejmen.



Drosero (*Drosera rotundifolia*).

Mi plantis ekzempleron en torfon, en speciala poto, kaj verŝis akvon sur ĝin, ĉar ĝi tre ŝatas tion. Mi zorgis pri ĝi kaj nutris ĝin per insektoj. Ĝi kreskis kaj floris en la somero. Ĝi havis malgrandajn, blankajn florojn. En la aŭtuno ĝi donis semerojn. Ĉiutage mi ĝin observis. Ĝi levis la rosumitajn haretojn de siaj folioj, kiuj eligas glueman sukon. Per ĝi mortas la insektoj, kiuj ek-

sidas sur ĝin. Poste ĝi fermas la insektojn en rondaj folioj kaj suĉas la vivosukon el la mortaj bestoj.

Drosero estas rara floro kaj enhavas sanigan sukcon.

La naturo estas tre bela, sed kelkfoje ankaŭ kaprica kaj kruela.

Bohumil Slavik, Rudé Armády 208, Turnov II, Ĉeĥoslovakujo.

Oro kaj Fero.

Je iu tago la oro fanfaronis al la fero: „Kio vi estas! Vi estas kruda, nigra fero. Mi estas oro! Mi brilas kiel la suno. El mi la homoj faras diversajn ornamilojn: brakringojn, orelingojn k.t.p. Sur la reĝa manĝotablo estas oraj kuleroj, forkoj, kalikoj. La reĝa krono estas el oro!”

„Tio estas vera”, respondis la fero. „Sed kia utilo? Vi nur brilas por la okuloj. Sed mi nutras la homojn. Sen mi la homoj ne povus kulturi la teron, fari por si domojn, fabrikojn, vaporsipojn kaj fervojojn. La plugilon, la fosilon, la hakilon oni faras el fero. Sen fero la homoj mortus pro malsato kaj sen oro certe ne.”

La oro hontis pro sia fanfaronado kaj eksilentis.

Marin W. Koev, Kazanlik, Bulgarujo.

KONKURSRUBRIKO.

Raportoj:

1. Mi estas tre kontenta, ricevinte 30 provojn el Francujo, Norvegujo (por la unua fojo), Nederlando kaj Anglujo. La provoj estis bonaj kaj ne estis facila afero elekti la plej bonan. Fine mi decidis, ke la dekjara **Letty Kaplan (Hilversum, Ned.)** gajnis la premion. Mi gratulas ĉiujn. Kelkaj skribis leterojn al mi: mi tre dankas ilin kaj la gepatrojn kaj la geinstruistojn. kiuj ofte skribas interesajn leterojn. A. Booy.

2. Nur 20 provojn mi ricevis, inter kiuj unu el Francujo kaj unu el Norvegujo. **Margaret Richardson** (Tinker's Farm, Birmingham, Brit) gajnis la premion. **Birgita Anjer** (Nordstrandhogda, Norvegujo), kiu estas nur 9-jara, tiel bone provis, ke mi jam plenumis ŝian peton: en letereto ricevi ekzemplon de „Johano kaj Silvio”. G. Moir.

3. Rezulto de la konkurso de januaro: Nur unu provo alvenis, bedaŭrinde. Konkludeble la temo estis tro malfacila. Tamen tiu, kiu alvenis, meritas premion. Ĝin verkis **Valerie Savin** (Rutherford, High School, Newcastle, Brit.). Mi gratulas ŝin pro ŝia laboro!

Rezulto de marto-aprilo: mi multe bedaŭras, ke mi ricevis provojn nur de tri knabinoj. Sed ĉiuj havas kelkajn bonajn ideojn. La montrado de alilandaj leteroj estas bona propagando, ĉar ĝi substrekas la praktikan uzon de la lingvo. Sammaniere oni povas paroli pri junularkunvenoj kaj la kompreno inter Esperantistoj.

Novaj Konkursoj:

1. (ĝis unujara lernado): Ofte oni povas fari du vortojn el la samaj literoj. Ekzemple: fako — kafo; gapi — pagi.

Alie ordigu la literojn en la sekvantaj vortoj por fari aliajn: aglo, arto, knabo, cepo, tendo, modo, forko, jako, parko, loko, mordi, nomo.

Eble vi povas trovi aliajn: se jes, aldonu kelkajn.

Sendu vian provon antaŭ la 10-a de julio al f-ino Booy, 96 Mansell Road, Birmingham 10, Anglujo.

2. (ĝis dujara lernado):

laŭtvoĉaj	folioj	laboras	akcidente	el la kaptilo
entuziasma	birdo	kantas	feliĉe	laŭ la strato
furioza	muso	helpas	senĉese	de la branĉoj
eta	vento	fosas	senmove	en la kampo
fortaj	feinoj	eskapas	volonte	al la klaso
dolĉvoĉaj	farmistoj	kuras	kune	el la nesto
sanaj	skolto	dancas	lerte	sub la tero
belaj	knabinoj	falas	rapide	sur la herbo
timema	knaboj	pendas	diligente	tra la arboj
verdaĵ	ministoj	blovas	laŭte	inter la tendoj

La kvin listoj konsistas el adjektivoj, substantivoj, verboj, adverboj kaj prepoziciaj komplementoj. En la nuna stato ili ne donas bonan frazon, sed se vi elektas unu vorton el ĉiu listo vi povas fari dek bonajn frazojn. Ekzemple: Laŭtvoĉaj knaboj kuras rapide laŭ la strato. Jen komenco! Elektu la naŭ ceterajn frazojn.

Sendu vian provon al s-ro Moir, 44 Francil Street, Fulwell, Sunderland, Anglujo, antaŭ la 10-a de julio.

3. (por ĉiuj): Preskaŭ ĉiu persono ĝuas la printempon kaj someron, sed ili ne havas la samajn bildojn de la sezonoj. Priskribu tipan pejzagon en via lando, unue dum la printempo kaj due dum la somero.

Sendu vian provon al f-ino I. G. Robins, 64 Aldridge Rd, Birmingham 22B, Anglujo, antaŭ la 10-a de julio.

Konkursreguloj: Skribu klare: 1. vian nomon; 2. vian naskiĝdaton; 3. dum kiom da tempo vi studis esperanton; 4. la nomon aŭ specon de via lernejo; 5. vian adreson. — Via instruisto aŭ unu el viaj gepatroj devas deklari, ke ĝi estas via propra (senhelpa) laboro.

Premioj por Konkursoj: Britoj povas ion elekti el la katalogo de la Brita Esperanto-Asocio ĝis la valoro de 2 ŝ. 6 p. por Konkurso I; ĝis la valoro de 3 ŝ. por Konkursoj II kaj III. Adreso: 140, Holland Park Avenue, London W II. En aliaj landoj la premio-gajnintoj devas elekti unu libron el jena listo: Konkurso I: „Esperanto por In-

fanoj" (Salomon), legolibro, aŭ „Komuna Kantlibro" (Holmes), kantoj kun muziko.

Konkurso II: „Tejo kaj Ĉerik" (Toms), historietoj, aŭ „Johano kaj Silvio" (Betts), legolibro kun angla vortaro aŭ „Neĝulino" (Grimm) aŭ libro el Konkurso-I-listo.

Konkurso III: „Kudlago, la malgranda Eskimo" (v. Hichtum), aŭ „Pinokjo" (Collodi) aŭ „La Nova Testamento" aŭ libro el la listoj por I kaj II.

Kiam vi scias, ke vi gajnis premion, skribu tuj al la Brita Esperanto-Asocio kaj sciigu tion. Elektu la libron, kiun vi preferas.

POSTMARKRUBRIKO.

Ĉi tiun fojon nur du kovertoj kun poŝtmarkoj. La unua el Polujo, de amiko Z. Czuba, la dua de Fritz Lichti el Svislando. Mi esperas, ke vi jam ricevis viajn ekzemplerojn, s-ro Czuba!

Grandan dankon al kamarado Lichti, kiu sendis al ni belajn svisajn poŝtmarkojn kiel donacon. Ĉiuj poŝtmarkokolektantoj ŝatas la belajn bildojn el via lando kaj ni transdonis vian donacon al tri junaj legantoj de L.J.V.

La poŝtmarkrubriko en L.J.V. estas sukceso. Tio restu! Tial ni petas vin kolektu por ni p.m., ankaŭ tre ordinarajn. Tiam la rubriko povas ĝojigi multajn junajn gamikojn.

Kiu sendas al ni kvanton da pm., kiom ajn grandan, ricevas preskaŭ ĉiam poŝtrevene same grandan kvanton da dezirataj pm. Ni petas al vi nur kunsendi respondkuponon.

Ne prokrastu! Sendu viajn poŝtmarkojn!

Libro-Servo T.J.O., Edamo, Nederlando.



6-a Internacia Junular-Kunveno
en Konstanz, Germanujo
(28/7—4/8 1950)

Adr. de la loka Organiza Komitato: Michel Schmidt, (17b)
Konstanz a. B., Grüngang 9

Nia I.J.K. ĝuas grandegan intereson! Anoncis sin eĉ pli da personoj ol ni povos akcepti. (380, el 19 landoj). Bedaŭrinde en ĉi tiu n-ro mankas la spaco por publikigi ĉiujn nomojn.

De la TJO-Karavano el Nederlando vojaĝos 33 personoj aŭtobuse al Konstanz. Gi petas helpon por trovi tranoktejojn en Fran-

cujo kaj Belgujo. Je 27-7-'50 ĝi estos en la ĉirkaŭaĵo de Nancy aŭ Metz. Je 10-8-'50 ni volonte tranoktus en la sudo de Belgujo. Tiuj samideanoj, kiuj volos helpi nin, bonvolu skribi al la gvidanto de la karavano: C. Geurts, lernejestro, Edam, Nederlando. Ni ne bezonos manĝaĵojn. Vi informu nin pri la kostoj.

SKOLTA RUBRIKO.



Aŭstrujo: Responde al letero de s-ro Steiner, landestro de la aŭstria esperantista federacio en Tirolo, la estraro skribis: „Pri la akcepto de Esperanto en nia programo ni estas pretaj konigi vian proponon al niaj grupoj.”

Danujo: Komence de la jaro 1949-a la Esperanto-movado inter la danaj geskoltoj restariĝis. La gazetoj de la du knabaj asocioj enhavis artikolojn pri Esperanto. Espereble artikoloj aperos baldaŭ ankaŭ en la knabinaj gazetoj.

La signo de Esperanto-interpretisto estas nun oficiale aprobita, almenaŭ en unu el la du knabaj asocioj. Dum oktobro 1948-a oni organizis du Cseh-kursojn, kiujn partoprenis pli ol 50 skoltoj.

Francujo: Jean Texier, fondinto de la du internaciaj rotoj esperantistaj, baldaŭ organizos Esperanto-kurson en grupo de neŭtralaj skoltoj. Oni kalkulis, ke estas minimume 200 Esperantistoj inter la francaj skoltoj (kiuj estas 200.000).

Irlando: Nun aperas rubriko pri Esperanto en la ĉiumonata gazeto „The Catholic Scout” (La katolika skolto).

Zigzaganta Hipopotamo.

Turista Asocio „La Naturamikoj”.

„La Turista Asocio „La Naturamikoj” estas migradmovado de laboristoj kaj disvastiĝis en multaj landoj eŭropaj kaj transmaraj. Ĉie oni ĝoje salutis kaj akceptis ĝiajn idealojn kaj ideojn. T.A.N. fariĝis granda internacia kultura kaj libertempa movado kaj hodiaŭ ĝia membraro prezentas konsiderindan multon.

Tio pruvas, ke la naturamika ideo estas ĝusta. T.A.N. celas stimuli bonan vivkoncepton kaj idealon por migrado en la bela libera naturo, el kiu oni ĉerpu novajn fortojn por la taskoj de la vivo kaj por la profesia laboro.

Por ebligi feriadon en belaj lokoj ankaŭ al malpli monhavaj membroj, multaj feriohejmoj kaj kabanoj estas kreitaj per ideala, senprofita kunlaborado de la membroj mem.

Sed internacia movado sen taŭga interkomprenigilo ne estas vere internacia kaj tial evoluis kaj fondiĝis la naturamika Esperanto-fako (T.A.N.—E.F.). T.A.N.E.F. celas aranĝi ankaŭ internaciajn kunvenojn kaj feriosemajnojn kun ekskursoj, el kiuj jam kelkaj okazis

Ĉi tio, estimataj legantoj, estas parto el letero, kiu falis en mian leterkeston. Sciuj, ke la sendinto de tiu letero estas la plej simpatia amiko de LJV kaj feliĉe ankaŭ de mi mem. Li estas Walter Kobelt el Svisujo.

Jam dufoje mi partoprenis en tiuj internaciaj kunvenoj en Svisujo. Kaj mi povas rakonti al vi, ke tiuj feriosemajnoj estas la plej feliĉaj semajnoj el mia vivo kaj tre malmultekostaj, mia kara amiko Walter Kobelt!

C. G., Edam, Nederlando.

GENERALAJ INFORMOJ.

Internaciaj Feriaj Kursoj de Esperanto okazos en Saint Germain en Laye (apud Parizo) de la 13-a de aŭgusto ĝis la 2-a de septembro.

Restado malpli longa povos esti konsentata. Ĉiu trovos sian lokon en unu el la kvar kursoj: komenca, daŭriga, perfektiga, seminaria.

Petu informojn al f-ino Jeanne Dedieu, 3 rue Arzac, Toulouse, Francujo.

„Mejloŝtono 1950” estas grandega ekspozicio, kiu nuntempe okazas en la belaj parkoj Sonsbeek kaj Zypendaal de la nederlanda urbo Arnhem. En la arte aranĝitaj pavilonoj oni ekhavas klaran impreson pri la mizera stato de Nederlando je la 5-a de majo en 1945, kaj pri la rezultatoj atingitaj en la sekvintaj kvin jaroj.

Gesamideanoj, venu kaj admiru! La Arnhemaj samideanoj bonvenigos vin. Direktu vin al „Arnhema Kunlaborkomitato”, Gravenstr. 16, Arnhem, Nederlando.

Junular-kunveno en Ommen, Nederlando, de la 22-a ĝis la 29-a de julio. Prezo 20 guld., inkluzive ĉion. Ankaŭ eksterlandanoj estos bonvenaj. Petu informojn al la sekr. de la Ned. Sekcio de TJO, K. Jonker, O. Graafdiijk, Nederl.

RICEVITAJ ESPERANTAĴOJ.

Gvidilo Oberammergau kaj Ettal. Prezo 1 resp. kupono. Mendebila al Geschäftstelle der Passionspiele (Esperanto-fako), Oberammergau, Germanujo.

A B C-Libro, eld. de The Esperanto Publishing Company Ltd., Rickmansworth, Anglujo. Prezo: 1 angla ŝil., aŭ 4 resp. kup. 14-paga libreto, kun 28 bildoj kaj 4-liniaj rimaĵoj, speciale taŭgaj por etaj infanoj, kiuj samtempe lernas Esperanton kaj la nacian lingvon. Tre fortika papero.

La Libreto estas mendebila ankaŭ ĉe la libro-servo de TJO.

Lernu Esperanton III (ĉapitroj 18-23): Komplementoj de l'Verbo. Verkita de Dan. Quarello, 32-p. libreto, eld. de Quarello & Cia, Buenos Aires, Argentino. Prezo 5 respondkuponoj.

La libreto estas la tria volumo en la kurso „Lernu Esperanton”, kiu celas esti gvidilo por verkistoj, tradukistoj kaj literaturamantoj.

Jarlibro-UEA 1950, 1-a parto. Ne-aĉetebla, ricevebla nur de Individuaj membroj de UEA. — Aligiloj haveblaj ĉe Universala Esperanto-Asocio, Heronsgate, Rickmansworth, Herts, Anglujo.

Solvoj: 1. ± 120.000 — 2. Baleno.

KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Bulgarujo: 17-j. lernantino, Tonka Ĉakarova, str. „Struma” N-ro 18, Burgas, dez. kor. Interesas pri jubileaj poŝtm., kaj ilustr. kartoj.

Kelkaj kadetoj dez. kor. k. gejunuloj el la tuta mondo, pri ĉ.t. Interŝ. pm., pk. Adr.: Kadeto Yvan Zojnov, H.B.M.Y., urbo Stalin (Varna).

Ĉeĥoslovakujo: Prelias Bedrich, 22-j., Sumbark 195, Ostravsko, dez. kor. kaj interŝ. il. kartojn kun la tuta mondo. Resp. certa.

N.E.A. en Dolní Suchá aranĝos Esp. ekspozicion je 25/VI, kaj petas esperantajojn el la tuta mondo. Klimsza Emilo, Dob. Suchá II/30, Silezio.

10 gesamideanoj diversaĝaj dez. kor. kun la tuta mondo. Skribu al A. Kosvancová, hodinárství, Ustí nad Labem, Benesovo námestí.

S. Humpa, „Obnova” Karlovy Vary dez. kor. Havas intereson pri Nederlando.

Italujo: Junulargrupo dez. kor. (precipe kun ĉeestontoj al I.J.K.) k. interŝ. poŝtm. Resp. certa, G.I.E. Sez. L'Aquila, Via S. Martino 8.

Japanujo: 17-j. studento dez. kor. k. studentoj kaj arĥitektoj. Interŝ. pm. k. pk. Somekawa-Yosinobu, Kohama Higasino cyo 1-3, Nisinari-ku. Oosaka-si (Oosaka-Fu).

17-j. studento dez. kor. k. juna franca laboristo aŭ studento. Yamane-Tuneo, III-28, Hannan Tyo-Naka, Abeno-ku, Oosaka-si (Oosaka-Fu).

18-j. studento dez. kor. kaj interŝ. poŝtm. kaj il. poŝtk. Tadasí Jamamoto, Mimiharatijo 1924, Sakai-Si, Osaka-ha.

Nederlando: Ni intencas vojaĝi per motorbiklo tra Germanujo; Danujo, al Svedujo (13/7-23/7). Ni serĉas tranoktejojn en Norda Germanujo kaj Danujo. Geedzoj W. J. de Leeuw, 't Zand (NH).

B. Brachetti, IJselstr. 16¹, Amsterdam, dez. kor. kaj interŝ. poŝtmarkojn kun la tuta mondo. Respondo certa.

Polujo: Juna filmisto dez. kor. pri filmtemoj. Skribu al: Jerzy Grum, Jelenia-Gora (Cervamont), strato Warszawska 5.

La Internacia Asocio de Junulinterfratigo eldonis ilustritan **prospekton en Esperanto**. La prospekto estas havebla (1 rk.) ĉe la Internacia Servo, Konijnenperken 109, Bruselo-Bosvoorde, Belgujo.

Eŭropa Turisma Servo prezentas en okcidenta Eŭropo taŭgajn hotelojn kun favoraj prezoj por esperantistoj. Esperantaj prospektoj estas haveblaj ĉe R. Loecx, Konijnenperken 109, Bosvoorde-Bruselo, Belgujo.

Ni gratulas: Ges-rojn Denis, en Saudrupt (Meuse), Francujo, al kiuj je la 2-a de majo naskiĝis filo: Bernard.

Philippe Cullus kaj Nelly de Spiegeleer, kiuj geedziĝos je la 22-a de julio. Ili estonta adreso estos: 13 rue Chopin, Anderlecht, Bruselo, Belgujo.

VERDLANDO VOKAS.

Listo de radio-dissendoj en aŭ pri Esperanto kaj informoj. Tempindiko laŭ la nederlanda (= mezeŭropa) horsistemo. Flandroj kaj aliaj Greenwich-temp-anoj bonvolu depreni unu horon.

Mallongigoj: I = informoj. P = parolad(et)o. K = kurso.

Ĉiutage	15.45—16.00	Prago, 25,51 m: I.
	19.45—20.00	Sofio, 39,11 m: I. kaj P.
	22.00—22.15	Prago, 31,41 m: P.
Dimanĉe	9.00, 11.00, 13.00	„Nigra Stacio”, 47.13 m: Gram.
	17.00—17.20	Romo, 19 m, 25 m: I. kaj muziko.
Lunde	6.30— 6.35	Vieno, 513 m, 25 m, 31 m, 41 m, 48 m: I.
	17.30—18.00	Rio de Janeiro, 375 m, 30,71 m: K.
	22.45—23.00	Prago, 470 m, 315 m: I. kaj P.
Marde	12.55—13.00	Berno, 48,66 m, 31,46 m: P. de d-ro A. Baur.
	18.40—18.45	Berno, 48,66 m, 31,46 m: Ripeto de la tagmeza elsendo.
Merkrede	0.45— 1.00	Gvatemalo 49 m: I.
	18.00—18.20	Lille, 235 m: P. (Nur ĉiuduamerkrede: 7 kaj 21 VI, 5 kaj 19 VII k.t.p.)
	20.15—20.30	Varŝavo III, 48,23 m: I.
	22.45—23.00	Prago, 470 m: I. kaj P.
	23.00—23.45	Prago, 470 m, 315 m: „La Verda Stacio” dissendas sian tre aŭskultindan artoprogramon!! (Nur la unuan merkredon de ĉiu monato).
Ĵaŭde	12.55—13.00	Berno, 48,66 m, 31,46 m: P. de d-ro Edmond Privat pri mondfederacio kaj paco.
	15.30—15.45	Graz (Alpland), 240 m: K. de prof. Hainschegg. (Nur la unuan ĵaŭdon ĉiumonate).
	18.40—18.45	Berno, 48,66 m, 31,46 m. Ripeto de la tagmeza elsendo.
Vendrede	9.05— 9.20	Parizo, 347 m: K. (Nur ĉiuduavendrede).
	16.40—16.55	Vieno 203 m, 48 m, 25 m, 31 m, 41 m: I. (Nur ĉiuduavendrede!)
	17.00—17.20	Romo, 19 m, 25 m: I. kaj muziko.
	18.15—18.30	Hilversumo N.C.R.V. 402 m: P. (Nur unufoje en 5 aŭ 8 semajnoj). 30-VI-50: A. de Smit pri „Ĉu espero aŭ timo?”

Informoj kaj petoj:

Parizo ankoraŭ silentas en Esperanto!! — Ĉu vi jam sendis petskribon al Franca Radio, Esperanto-fako, Parizo, pri reokazigo de la Esperanto-elsendoj? Se ne, b.v. skribi! Se jes, bonvolu reskribi!

Agrablan aŭskultadon deziras al vi ĉiuj S. S. de Jong Dzn., Radio-Servo N.C.K.E., Waltaweg 3, TJERKWERD (Frislando), Nederlando, al kiu oni sendu ĉiujn informojn pri radio-elsendoj.